

P A C O k a j J U S T E C O .

 Monata revuo de la grupo B r u g g e .

Sekcio de Flandra
 Ligo Esperantista.

.....
 Prezidanto : Drs F. Roose, J. & M. Sabbestr. 12, Brugge - Tel. 31981 .
 Sekretariejo : Iserentant R., Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge
 Interŝanĝo : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek .
 Poŝtkonto : 291429 - Maertens Grég. Assebroek.

LA LUMO EL ORIENTO.

 II.

500 j. antaŭ Kristo vivis en Norda Hindujo, princo kies nomo estis SIDDHARTA. Kiam venis la tempo por edziĝi, laŭ la moroj, la gepatra ordono kaj la kutimo, li elektis la belegan princinon TARODARA. Sed li ne estis sola. Ankaŭ aliaj princoj volis sin kiel edzinon. Kaj ne utilis la aserto nek la famo ke li super ĉiuj estis Difavorita, mense kaj korpe. Li, same kiel la aliaj, devis pravi siajn kapablecojn. Do, je iu tago, ĉiuj kunvenis sur grandega tereno por la granda konkurso.

Unue ili devis, je longa distanco, per sago trabori kupran tamburon. Ĉiuj sukcesis. Li ordonis meti la tamburon je duobla distanco. Tiam li prenis en la manoj pafarkon kiun li tuj rompis. El la templo oni alportis alian, fortegan, grandegan, kiun neniu kapablis uzi; per tiu pafarko li traboris la tamburon kaj post la traboro, la sago restis ankoraŭ je iu distanco flugi tra la aero.

La dua provo konsistis en tio-ĉi ke ili devis per glavobato trafendi arbon. Ĉiuj sukcesis. Siddharta iris al loko kie staris du arboj unu apud la alia, kaj per unu fortega glavobato li tranĉis la du tiel rapide kaj nete ke la arboj restis stari: ĉiuj konkurso-antoj eksplodis pro ĝojo, kredante ke li ne sukcesis. Sed venis vento kiu faligis la du arbojn kaj tiam ili vidis la netan, glatan tranĉaĵon.

La tria provo estis la dresado de unu sovaĝega kaj grandega ĉevalo. En tio, nur Siddharta sukcesis. Do li estis la elektito por Tarodara. La gepatroj pensis ke estus ege bedaŭrinde se iu viva malfeliĉo atingus tiel idealan paron. Tial ili konstruigis belegan kastelon kaj ĉirkaŭe grandegan ĝardenon. Kaj tre alta muro ĉirkaŭis la ĝardenon tiel ke la geprincoj vivis tute izolitaj de la cetera mondo. Sed foje Siddharta ekkaptis la deziron vidi la eksteran vivon kaj demandis permeson al la patro. La patro konsentis sed antaŭ la eliro de la princo li ordonis ke oni ĉion tiel bonege organizu ke la princo ne vidos iu ajn malbelaĵon de la vivo. Do, kiam la princo eliris, ĉiuj vojoj kaj ĉiuj stratoj estis ornamitaj. Ĉie sonis muziko. Ĉiuj malsanuloj kaj almozpetantoj devis forresti el la publikaj vojoj. Cio estis lavita, purigita tiel ke la mondo aspektis paradizo. Sed malgraŭ ĉiuj zorgoj kaj klopodoj, unu almozpetanto sukcesis resti sur la strato kaj alproksimiĝis de la Princo. Siddharta havis mallongan interparoladon kun tiu viraĉo, tamen longan por kompreni ke la vivo havas ankaŭ multajn malbelaĵajn flankojn. Post la reveno, Siddharta demandis al la patro ĉu li povos foje vidi la mondon sen la antaŭaj preparoj. Kun doloro en la koro, la patro konsentis, komprenante ke li tamen ne daŭre kapablos teni sian filon for de la realaĵoj. Do, iun tagon, li, je la dua fojo, eliras la ĉirkaŭaĵon, kaj kion li vidas ekstere? Kelkaj puraj domoj kaj vojoj sed la plej granda parto malpuraj kaj malbelaĵaj. Multegaj almozpetantoj. Malsanulejoj kun terure saferantaj homoj. Je iu momento li vidis grupon da personoj fanatike interbatalantaj. Policistoj kiuj fatrenas tri homojn kiuj ŝtelis kaj mortigis. Kaj ankaŭ, estis la unua fojo ke li vidis tion, li vidis la morton. Procesio da homoj forportis senmovan kadavron kiun oni poste forbrulis kaj la cindroj estis ĵetataj en la GANGES, la sankta rivero. Cio, kun teruro en la koro, kaj granda konfuziĝo en la menso,

Siddharta demandis klarigon. Kaj tiel, li eksciis ke por ĉiu, la vivo estas plena je malfeliĉoj kaj ke je la fino venas por ĉiu la morto. Plene malgaja li revenis al sia kastelo. La sekvintan nokton li leviĝis. Iarodara kuŝis sur lito de rozfolioj. Si havis en la brakoj la unuan infanon. Tre mallaŭte li forlasis ilin. Ĉiuj porĉoj el si mem malfermiĝis kaj post li refermiĝis. Li komencis vagadi. Malproksime en arbaro li ĉemetis la luksajn vestaĵojn kaj ekportis simplajn, riparitajn, flikitajn vestaĵojn. Kaj tiam komenciĝis la granda vagado. . . kaj predikado. Al la Brahmanoj li diris ke ilia ĉefdio certe ne estis la vera Dio, ĉar li faris la mondon tiel malbela kaj malbona. Kaj li predikis kiamaniere la mondo povas pliboniĝi. La instruo povas esti resumata en 5 punktoj :

1. Vi ne mortigos - 2. vi ne ŝtelos - 3. vi ne vivos malĉaste - 4. vi ne mensogos - 5. vi ne trinkos ebrilgajn trinkaĵojn.

Efektive, tiuj liaj kvin ordonoj, formas la kvintesencon de ĉio malbona sur la tero. Tiuj kvin, pli ol la dek ordonoj de la Kristanismo kiuj unuflanke ne estas kompletaj kaj aliflanke troaj, ĉar kelkaj estas ripetoj de antaŭaj kiel la 6a kaj 9a kaj la 7a kaj 10a. Ĉemetante la materiajn fortojn de riĉeco kaj potenco, li akiris preskaŭ tutan Azion ĉar post la morto li estis honorata kiel Dio (la lumigito = Budao) kaj lia instruo iĝis la religio de Ĉinujo, Japanujo, Tibeto, Insul-Hindujo, malantanea Hindujo, kaj tie kie vivis popoloj en Siberio, ĝis Orienta Eŭropo.

Postvenintaj generacioj kompletigis aŭ aliformigis ĝin per strangaj ritoj, institucioj k.t.p. tiel ke postulus specialan longegan artikolon la problemo en kiu grado tiuj orientuloj ankoraŭ vivas laŭ la ordonoj de Budao.

 N I R E C E N Z A S :

L. Malaŝ "Misisipi" teatraĵo en 3 aktoj - el la Juda lingvo, tradukis I. Jurysta - 64 p. eld.: Juda Esperantista Grupo en Parizo 1932 - kun antaŭparolo de la tradukinto kaj kun biografie artikolo pri la verkinto.

La titolo estas la nomo de la granda riverego de Nord-Ameriko, Indiana vorto kiu signifas "Patro de la riveroj".

La teatraĵo pritraktas seksmoralan skandalon kiu skuas la publikan opinion kaj reaktivigas la malamon de la blankoj kontraŭ la negroj. La aŭtoro klopodas por pravi ke la kapitalismo estas la kulpulo. En tia provo li komplete malsukcesas, ĉar en neniu fazo de la dramo ni vidas tion. Ni ja vidas funkciulojn kiuj faras la malon de sia devo. Ni vidas nekapitalisman amason hurli kaj postuli la morton de la negroj. Sed ni ne vidas la laboron aŭ la intrigojn de ĉiu kapitalismaj sistemo aŭ grupoj; cetere en tio la aŭtoro similas al granda parto de la naci-socialista partiano. Por tiu lasta, la judismo kulpas pri ĉio malbona. Por la aŭtoro, okazu kio ajn malbona, la kapitalismo kulpas. Sed la realaĵo ne estas tiel simpla. Montrante ĝin tiel simpla oni jes kapablas kuntiri grandajn amasojn; ĉar la amaso serĉas kulpulon por ĉiuj malbonaĵoj kaj samtempe konvenas al ĝia psikologio se oni simple montras unu grandan kulpulon. Tiu amaso ne plu komprenemas se oni faras multajn distingojn kaj se oni montras ke fakte ĝi mem unue devas ĉiurilate pliboniĝi. Sed tiamaniere oni ne iras al la fundo de l'afero. . . kaj oni ne faras servon al la homaro. La negroj kiujn la aŭtoro priskribas estas same personoj kiel la blankuloj. Kaj se tiu okazintaĵo okazus en Medio nur blankhaŭtula, aŭ en Medio malgranda de nur kapitalistoj, ĝi aperigus samajn konfliktojn. Homoj kiuj ne obeas al siaj pasioj kreas intermalamikcecon. Kaj neniu sistemo aŭ ismo ludas rolon en tio. La dispartigo en du aŭ pli da partioj estas nur instinkta, tiam. La verko ankoraŭ ne havas literaturan valoron. Do ne estas pliriĉigo de nia E^o literaturo.

(()) (()) (()) (()) (()) (()) (()) (()) (()) (())

EL POLLANDO :

"Pola Radio" Varsovio III, ondlongo 49,06 m distendigas ĉiu merkredojn la horo 21 m. 10 laŭ Gr. tempo en Esperanto prelegojn kaj infanojn pri Pollando.
 Adresu al "Pola Radio" Warszawa, Koszykowa 8.

Ne ofte aŭditaj vortoj.

Ni publikigas tie-ĉi el "La Militrezistanto", somero 1948 - n° 51, paĝo 9, biografian artikolon pri interesa persono tia kian oni ne plu ofte renkontas en la vivo kaj kiu tamen montriĝas esti bela personeco:

PROF. DR. MICHEL BRIQUENEER MONTIGITA.

Michael Briqueneer estis membro de W.R.I. dum pli ol 10 jaroj. Li estis Prof. de klasika filologio en la Royal Athenaeum en Jodoigne, kaj eminenta lingvisto. Li kontribuis al la belga ĵurnalo "Le Rouge et le Noir" kaj al la francaj pacifistaj ĉiusemajnaj ĵurnaloj "Le Barrage", "La Patrie Humaine", kaj "La Voie Nouvelle", sub pseŭdonomo Elie Chilmez kaj Michel de Priene. Li verkis multajn artikolojn per kiuj li defendis la tezon pri Absoluta Pacifismo kaj la rajton de la Prokonsciencia Militrifuzanto. Li estis membro de "Ligue Scolaire Internationale pour la Paix", la "Ligue Internationale des Combattants de la Paix", la "Peace Pledge Union", la Paco-Armeo de la Belga "Comité de Vigilance des Intellectuels anti-Fascistes" kaj de la "Rassemblement contre la guerre".

Jen rakonto pri liaj agadoj dum la lastaj ok jaroj por la paco kaj reakordigo de la popoloj.

"En la malgranda urbo de Jodoigne kie li instruis, li estis, kiel pacifisto, kontraŭmilitisto, kaj individuismisto, submetata al malkompreno kaj kalumnio de la amaso. Sed tio ne ĝenis lin.

"Dum 1937 li savis infanon el San Sebastien dum la Hispana Civila Milito, Ramon Redriguez Bevastegui. Nun la malgranda Ramon fariĝis juna viro kaj loĝas kun S-ino Briqueneer en Bruselo. Dum la milito oni revokis lin al Hispanujo por ricevi sian "Naciistan Edukadon", sed "Padre Miguel" rifuzis obei la postulojn de la Hispana Konsulo.

"Dum 1938 li savis alian rifuĝanton - juna aŭstra Judino. Si loĝis en lia hejmo kelkajn semajnojn kaj li helpis sin iri Amerikon. Dum 1939 li gastigis francajn militrifuzantojn kaj unu el ili fariĝis lia bofilo. Kiam la milito komencis en Belgujo en 1940, Majo, oni arestis lin kaj lian bofilon kiel "Komunistoj" kaj "Progermanoj" laŭ ordono de la loka policisto kiu malamis nian bonan pacifistan instruiston. Reliberigata kelkajn tagojn poste li revenis hejmen, kaj dum la longaj vicoj de francaj, belgaj kaj anglaj militkaptitoj pretermarŝis lian domon survoje al Germanujo, li kaŝis du belgajn kaj du francajn, soldatojn, donis al ili civilajn vestojn, kaj ebligis ke ili ekiru hejmen. Sub la Nazi-okupado li firme tenis sian pacifistan sintenadon, esprimante malamon kontraŭ milito kaj perfortado kaj bezonon por reamikiĝo. Kompreneble tiaj diroj estis rigardataj kiel progermanaj, flanke de la Patriotoj, kaj proaliancaj, flanke de la pro-Nazioj. Sed lia celo estis kontraŭi la mensogojn de la milittempo.

"Kiam la Nazioj mobilizis la belgajn laboristojn li konsilis al la studentojnade la "Rhetorique" Klaso, rifuzi tian devigan laboron, invitante ilin rekomenci sian lastan lernejan jaron en la Athenaeum, kaj atendi iri al la universitato ĝis la venko de la danĝero. Li metis sian perfektan scion pri la Germanoj al la servo de Neperforta Rezistado, helpante proksimume kvindek junulojn eviti devigan laboron en la militfabrikejoj de la tria Regno. Li havigis por tiuj knaboj falsajn atestilojn de kuracistoj kaj burgomastroj. Unufoje li estis devigata peti kuraciston kaj burgomajstron de Jodoigne (ambaŭ membroj de la rezista movado) por falsaj paperoj por savi junulon. S-ro Briqueneer ne hezitis iri mem sur la "Werbestelle", revenante hejmen post longaj kaj maltrankviligaj diskutoj kun la Germanoj, sed kun la evitilo por lia pro protektato. Nur unu peto-tio estis rifuzita. Tiu libervola servo ne estis sendanĝera por li. La Nazi'oj ne satis lian persistadon, ĉar ĉiufoje ili perdis unu helpanton por ilia milito, kaj la Patriotoj perdis unu viron por la "maquis".

"Li mem estis alvokita al deviga servo apud Jodoigne sur unu el la ĉefaj aviadilejoj de kie la "Stukas" ekvojaĝis al Anglujo. Li estis la sola rifuzanto de tia laboro (el loĝantaro 100% "patriotoj"). La Nazi'oj ne tuŝis lin. Fine li forlasis la flandran movadon post ĝia kompromizo kaj kunlaborado kun faŝistaj kaj militaj Nazioj. Lia pacifista bonvolo estis malkomprenata de la amaso. Milito-psikostato kaj personaj malŝatoj rezultis en malkompreno de liaj motivoj kaj oni nomis lin malamiko danĝera por la perforteca socio.